EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- AMO 63 V ekis!
- .La unua virtuala AMO-seminario
- Reta kongreso en irano


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-14 sendita el Budapeŝto la 18an de aprilo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Sukcesa reta kongreso de Irano

Tra la lastaj du tagoj okazis pere de la komunikilo Zomo (*Zoom*) la irana kongreso, kun multaj dekoj da partoprenintoj, ne nur el irano sed el multaj anguloj de la mondo. Certe partoprenis pli da homoj ol pli frue povis fizike partopreni.  Legu la programon kaj pliajn informojn ĉe: https://www.espero.ir/eo/

# AMO en virtualaj tempoj

Ene de la lasta horo ekis la 63a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), la unua kiu okazas virtuale, pere de la reto.  Alkroĉe vi trovos la malferman prezentaĵon, kiu okupis nur dek minutojn, por lasi tempon por la plenega programo. Tiun programon vi trovos en la alkroĉaĵo.

Jen la cetera programo por hodiaŭ. La seminario daŭros morgaŭ ekde 15.00h laŭ la irana tempo (12.30h laŭ CEST).

La 18a de aprilo, (15.00 – 18.45) irana tempo (12.30 CEST):

15.00 – 15.10 Malfermo kaj enkonduko (SMG) nur voĉe kaj ekrane.

15.15 – 16.00 Ahmad Reza Mamduhi: 'Kiel instrui Esperanton dum pandemio?'

16.15 – 17.00 Hamzeh Shafiee: 'La aplikaĵoj por virtuala babilado'.

17.10 – 17.50 Hamid Babadi Akasheh, prezidanto de IREJO, TEJO en Irano, 'Kiel maturigi aktivajn junulojn por la pandemio'

18.00 – 18.45 Humphrey Tonkin, dufoja prezidinto de UEA: 'La esprimkapablo de Esperanto'

Vortoj: 280